



Chantons dans la rue
**Chantons dans la rue
des chansons françaises
en espéranto
avec La Kompanoj**



Surstrate kunkantu ni
**Surstrate kunkantu ni
francajn kanzonojn
en esperanto
kun La Kompanoj**

Espéranto-Vendée fête ses 20 ans avec La Kompanoj	4
Description succincte de la structure de l'espéranto	5
Amsterdam' _ Amsterdam.....	6
Estas ĝoj' verda _ Y a d' la joie	6
Irlanda balado _ Ballade irlandaise	7
Jen via mondo _ This land is your land.....	7
Kiam regos am' sur ter' _ Quand les hommes vivront d'amour.....	7
Kiam restas am' nur _ Quand on n'a que l'amour	8
Kisu min ankoraŭfoje! _ L'ptit quinquin – L'cançon dormoire.....	8
La bufoj _ Les crapauds.....	8
La dizertonto _ Le déserteur	9
La esper' senlima _ L'espérance folle	9
La festo _ La fête	10
La kongresurboj _ laŭ Les petits patelins.....	10
La nordirlanda balado _ La ballade nord-irlandaise.....	11
La sudo _ Le sud.....	11
La tempo ĉeriza _ Le temps des cerises	12
Lili _ Lily.....	12
Majorana _ Marjolaine.....	13
Mina mond' _ Les corons.....	13
Nova mond' _ Un autre monde	14
Sur la placo _ Sur la place	14
Tuj la kompanar' _ Les copains d'abord.....	15
Volas mi _ Je veux	15



Qui sommes-nous ?

Espéranto-Vendée est une association loi 1901 indépendante, créée en 1996 dont le but est d'organiser, à des fins éducatives, culturelles et sociales, la diffusion de la Langue internationale Espéranto par l'information, l'enseignement et diverses formes d'action.

Nous organisons des cours oraux à la demande dans la limite de la disponibilité d'enseignants qualifiés sur le secteur concerné. A la Roche sur Yon, des journées complètes de pratique de la langue sont organisées, un samedi par mois, de octobre à avril.

Nous participons régulièrement à des manifestations en lien (ou pas) avec l'international : Semaine de l'Europe, Fête du livre jeunesse, Enfantaisies, Semaine de la Soidarité Internationale, Forums associatifs ...

Pour nous contacter : <http://esperanto-vendee.fr> ou esperanto-vendee@orange.fr

Qu'est-ce que l'espéranto ?

L'espéranto est une langue internationale, de synthèse, dont les bases élaborées par un ophtalmologiste polonais, Louis-Lazare ZAMENHOF (1859-1917), ont été publiées en 1887 sous le pseudonyme de « Doktoro Esperanto ». Depuis plus d'un siècle, sa pratique régulière à travers le monde lui a donné sa patine et son statut de langue vivante à part entière. Sa grammaire simple et logique, qui ne comporte que 16 règles de base sans exception, fait de l'espéranto aujourd'hui la langue la plus rapide à acquérir, avec un minimum d'effort. Voir le descriptif ci-contre.

Qui sont « La Kompanoj » ?

La Kompanoj (Les Copains) est une troupe de théâtre et chants d'Espéranto-Gironde fondée à Bordeaux en 1990. Parmi eux, FaMo (accordéon et chant) et Marcelo (coordinateur et chant) sont initiateurs du projet « Chantons dans la rue des chansons françaises en espéranto avec La Kompanoj ».

Ce samedi après-midi (de 14h à 16h), Famo (à l'accordéon), Pierre (à la guitare) et Bernard (au soubassophone) accompagnent des chanteurs venus des quatre coins de France pour interpréter et faire chanter au public les chansons françaises très connues de ce livret qui ont été traduites en espéranto à l'occasion du congrès international de Lille en juillet 2015. En soirée (de 20h30 à 22h30), à l'auditorium du conservatoire, ils chanteront BREL en espéranto.

Pour les contacter : <http://lakompanoj.free.fr> ou marcel.redoulez@wanadoo.fr

Si vous aimez chanter, sans hésiter joignez votre voix à celles de « La Kompanoj », votre soutien est le bienvenu : un refrain fredonné, un sourire chanté, des rythmes frappés des mains ou des pieds, une rengaine balancée de la tête ou des hanches, une danse enlacée ou une chaîne déchainée ...

Description succincte de la structure de l'espéranto

L'Alphabet et la prononciation

(une lettre = un son, un son = une lettre)

La plupart des lettres se prononcent comme en français, les prononciations particulières sont indiquées entre crochets :

a, b, c [ts comme **ts**unami], ĉ [tch comme **tch**èque], d, e [é comme éléphant], f, g [g comme **g**are], ĝ [dj comme **dj**ellaba], h [comme home en anglais], ĥ [comme la jota espagnol], i, j [y comme yoga], ĵ [comme le j français], k, l, m, n, o [ouvert comme dans bol], p, r [légèrement roulé], s [s comme **s**inge], ŝ [ch comme **ch**anter], t, u [ou comme **ours**], ŭ [w comme **w**att], v, z.

La formation des mots

Les mots sont formés par des racines auxquelles on ajoute des terminaisons et des affixes pour en modifier le sens. On peut former tous les mots qui ont un sens en combinant entre eux les racines, les terminaisons et les affixes. L'accent tonique se situe toujours sur l'avant dernière syllabe.

- Les racines sont issues des principales langues européennes et ont été choisies, en raison de leur internationalité.
- La terminaison indique la nature du mot : voir tableau ci-dessous
- Les affixes s'ajoutent devant les racines (préfixes) ou entre la racine et la terminaison (suffixes). Voir exemples ci-contre.

<u>Quelques affixes</u>	Définitions	Exemples
MAL	Contraire	Avec la racine « Varm » et ces trois affixes on forme : - Varma = Chaud, - Malvarma = Froid - Varmeta = Tiède - Varmega = Brûlant - Malvarmeta = Frais - Malvarmega = Glacé
ET	Diminutif	
EG	Augmentatif	
IN	Féminin	Avec la racine « Ĉeval » et ces cinq affixes, on forme : - Ĉevalo = Cheval - Ĉevalino = Jument - Ĉevalido = Poulain - Ĉevalidino = Pouliche - Ĉevalejo = Ecurie - Ĉevalaro = Troupeau de chevaux - Ĉevalisto = Palefrenier
ID	Descendant	
EJ	Lieu	
AR	Groupe	
IST	Professionnel	

<u>Terminaison des mots et conjugaison</u>		Remarques			Exemples avec la racine ' kant '
Les noms	O	Pluriel OJ	Accusatif ON	Pluriel + Acc OJN	kanto = chant
Les adjectifs	A	AJ	AN	AJN	Kanta = chanté(e)
Les adverbes	E		EN		Kante = en chantant
Les verbes à l'infinitif	I	Il n'y a aucun verbe irrégulier en espéranto. Les terminaisons sont invariables de la 1 ^o personne du singulier à la 3 ^o personne du pluriel.	Les pronoms personnels		Kanti = chanter
... à l'indicatif présent	AS		Je	Mi	Mi kantas = Je chante
... à l'indicatif passé	IS		Tu	Ci/Vi	Vi kantis = Tu chanta
... à l'indicatif futur	OS		Il / Elle Neutre	Li / Ŝi Ĝi	Li kantos = Il chantera Ŝi kantos = Elle chantera
... au conditionnel présent	US		Nous	Ni	Ni kantus = Nous chanterions
... à l'impératif présent	U		Vous	Vi	Vi kantu ! = chantez !
... au subjonctif présent	U		Ils	Ili	Ili kantu ! = qu'ils chantent !
... au participe présent actif	ANTA		Les participes peuvent s'employer seuls, ils se comportent alors comme des adjectifs. Ils peuvent s'employer avec l'auxiliaire être (esti), ils forment alors les temps composés. Exemples: Li estis kantonta : Il allait chanter Li estas kantinta : Il a chanté Li estos kantinta : Il aura chanté		Kantanta = chantant
... au participe présent passif	ATA				Kantata = Etant chanté
... au participe passé actif	INTA				Kantinta = Ayant chanté
... au participe passé passif	ITA				Kantita = Ayant été chanté
... au participe futur actif	ONTA				Kantonta = Allant chanter
... au participe futur passif	OTA				Kantota = Allant être chanté



Amsterdam' _ Amsterdam

muziko kaj franca teksto: Jacques Brel - e-a teksto: Silĉjo Barrier + Serge Sire kaj Vito Markovo

+ traduksipo en Gresiljono oktobre 2013 + FaMo-modifoj

En haven' Amsterdam'
De marist' jen kanzon'
Pri revad', pri fantom'
Drive de Amsterdam'
En haven' Amsterdam'
De marist' jen la dorm'
Kiel flaga ornam'
Laŭ la morna marbord'
En haven' Amsterdam'
De marist' jen la mort'
Pro ebrio, pro dram'
Ĉe la lim' de aŭror'
Sed, en haven' Amsterdam'
De marist' jen naskiĝ'
En varm-peĉa kondiĉ'
De langvor-ocean'

En haven' Amsterdam'
De marist' jen la manĝ'
Glime brila fiŝaĵ'
Kun tre laŭta deklam'
Sub fortega dentar'
Krakmordiĝas fortun'
Malarkiĝas la lun'
Eĉ ronĝeblas la staj'
Kaj moruas odor'
En fritajo ĝis la kor'
Li per man' petas pli
Ja por plua porci'
Li ekstaras kun rukt'
Kaj tempesta ekrid'
Post pantalon-rezip'
Nun elir' al volupt'

En haven' Amsterdam'
De marist' jen la danc'
Ĉe la ventr' en balanc'
Ina ventro aŭ mam'
Li turniĝas en danc'
Kiel fuŝlampion'
Dum la akordion'
Sonas kun ŝir' kaj ranc'
Jen tordita la kol'
Por la pli bona sent'
De rid', de kapriol',
Ĝis la fina silent'
Tiam per gesto grava
Per altranga mien'
Li kun ino batava
Iras al luma plen'

En haven' Amsterdam'
De marist' jen la drink'
Kaj la drink', kaj redrink'
Kaj denova redrink'
Je l' sano de la putin'
De Hamburg', Amsterdam'
Aŭ de ajna haven'
Nu li drinkas je dam'
Je don' 'de ŝia bela korp'
Don' de ŝia virthonest'
Por monero el or'
Kaj li dum ebriec'
Prancas al la ĉiel'
Nazon viŝas en stel'
Pisas dum ploras mi
Pri la adultulin' ...

... En haven' Amsterdam', En haven' Amsterdam', En haven', en haven', En haven' Amsterdam'

(Versio 2016-09-05)

Estas ĝoj' verda _ Y a d' la joie

muziko Charles Trenet ; franca teksto R. Breton, M. Emer ; humura adapto Marcelo

Estas ĝoj' ! Saluton al vi, la hirundoj,
Estas ĝoj' ! ĉiele super dom' kaj voj'
Estas ĝoj' ! kaj brila suno super grundo
Estas ĝoj' ! ja ĉie la ĝoj' !

Estas ĝoj' UEA festas resurekte
Por ĉi foj' senpaga estas la kongres'
Spitas boj' : « Ne plu necesas monkolekto !
Homoj, hoj ! Ja vivu progres' ! »

Estas ĝoj' ! Saluton al vi, la hirundoj,
Estas ĝoj' ! ĉiele super dom' kaj voj'
Estas ĝoj' ! kaj brila suno super grundo
Estas ĝoj' ! ja ĉie la ĝoj' !

Tage jam ŝancele batas korinklinoj
Por la am' venante nova por ĉi foj',
Por la am' saluton al vi, junulinoj !
Estas ĝoj' ja ĉie la ĝoj' !

Estas ĝoj' ĉiuj artistoj kun restpekto
ludas hoj ! riĉige laŭ kontrakt' sen ĉes' !
Estas ĝoj' SAT venkis malSat-insurekton
En konvoj' anar' nombras ses !

Tage jam ŝancele batas korinklinoj
Por la am' venante nova por ĉi foj',
Por la am' saluton al vi, junulinoj !
Estas ĝoj' ja ĉie la ĝoj' !

Nun el ĉiu land' dank'al facila vent'
Alflugis al kongreso kun urĝa sent'
Geesperantistoj tri dek mil ok cent
Kun verda ĉemizo por plej bona prezent'.

Subite pro sku' mi vekiĝas en lit' ;
Nur revis mi ĉar griza estas zenit.'
Nun nepras ekstart' por sinlav' kaj sinvest'
Kaj ĉeso de l' kant', se mankas vorto por rest'.

(Versio 2016-09-05)

Miraklo sen nom' : diras kun elokvent'
Kaj belidiom' sen idista akĉent'
Ne urbestro nur, sed eĉ la Prezident'
« Bonvenon al vi ! Ĝuu ni kun kontent' ! »

Sed tamen ĉi rev' al mi venis kun bon',
Ĉar flirtis en ĝi riminspir' por kanzon' !
Kanzon' el printemp', kanzoneto de l' am',
Kanzon' de l' juntemp', kanzon' de l' ĉiam'.



Irlanda balado _ Ballade irlandaise

muziko E. Stern; franca teksto E. Marnay; kantis Bourvil; e-a teksto Marcelo kaj Silĉjo



De oranĝarb' sur irlanda insul'
Neniam videblos uln'.
De neĝa tag' kun lilaka parfum'
Neniam videblos lum'.

Gravas ne l' afero !
Gravas ne l' afero !
Vi dormas apud mi,
Apud la rivero
Kie dum vespero
Batas hejmkor' kun pasi'.

De oranĝarb' sur irlanda insul'
Neniam videblos uln'.
En mia brak' aliulo ol vi
Neniam videblos ĝi.

Gravas ne l' afero !
Gravas ne l' afero !
Dormas vi apud mi,
Akvon de rivero
Ĝuas Ionicero
Pri via dorm' vartas mi.

De oranĝarb' sur irlanda insul'
Neniam videblos uln'.
De neĝa tag' kun lilaka parfum'
Neniam videblos lum'.

Gravas ne l' afero !
Gravas ne l' afero !
Ĉeestas vi, etul', nun.

(Versio 2014-12-15)

Jen via mondo _ This land is your land

usona teksto kaj muziko W. Guthrie, laŭ tradicia usona folkmuziko; e-a teksto W. F. Pilger

Refreno

Jen via mondo, jen nia mondo,
Kun monta neĝo kaj mara ondo,
De la tropikoj ĝis la polu(u)soj:
Jen vasta mond' por ĉiuj ni !

Strofo 1

Kiam mi iris sur voj' sen celo,
Jen supre brilis blua ĉielo,
Kaj orregalo ŝajnis grena va(a)lo:
Jen vasta mond' por ĉiuj ni !

Refreno

Muzika transiro 1

Strofo 2

Vagante, spurojn mi sekvis lerta,
Kaj min turmentis soif' dezerta,
Dum mi sopiris, iu voĉo di(i)ris,
Jen vasta mond' por ĉiuj ni !

Refreno

Muzika transiro 2


Strofo 3

Mi la okulojn ŝirmis per mano,
Kaj mi vidis ondojn de ocea(a)no,
La suno dronis kaj voĉo so(o)nis:
Jen vasta mond' por ĉiuj ni !

Fina refreno

Jen via mondo, jen nia mondo,
Kun monta neĝo kaj mara ondo,
De la tropikoj ĝis la polu(u)soj:
Jen vasta mond' por vi,
Jen vasta mond' por ni,
Jen vasta mondo por ĉiuj ni !

(Versio 2014-12-15)



Kiam regos am' sur ter' _ Quand les hommes vivront d'amour

muziko kaj franca teksto Raymond Lévesque; e-a teksto Jo-Petro Danvi

(1)

Kiam regos am' sur ter',
Alvenos tagoj sen malsato ;
Ne plu premegos la mizer',
Sed ni jam estos mortaj, frato !

En la longega vivoĉen'
En kiun pelas nin la sort',
Al ĉiuj viv' ! al ĉiuj mort' !
Nin trafis nur sufero kaj ĉagren.

(2)

Sed kiam regos am' sur ter',
Ĉu restos iom da kompato
En tiuj tagoj sen mizer'
Por ni, de longe mortaj, frato ?

En la grandega vivolud'
Finiĝos bele la parti',
Sed la perdantoj estu ni.
Jen tie ĉi plej saĝa la konklud'.


Kiam regos am' sur ter',
Trobadoriĝos la soldato ;
For la milit' for la karcer'.
Sed ni jam estos mortaj, frato !

Kiam regos am' sur ter',
Alvenos tagoj sen malsato ;
Ne plu premegos la mizer',
Sed ni jam estos mortaj, frato !

Ni, kiuj en temp' de sufer'
Kaj de milit' kaj de malŝato
Serĉadis pacon sur la ter',
Sed kiun ili ĝuos, frato.

Kiam regos am' sur ter',
Alvenos tagoj sen malsato
Ne plu premegos la mizer',
Sed ni jam estos mortaj, frato !

(Versio 2014-12-15)



Kiam restas am' nur _ Quand on n'a que l'amour

muziko kaj franca teksto Jacques Brel - e-a teksto Georgo Lagrange, Marcelo, FaMo

Kiam restas am' nur Kiel dona mesaĝ' Por la granda vojaĝ' De la am-aventur',	Kiam restas am' nur Por meblad' per fortun' Kaj kovrado per sun' De l' tristec' en suburb',	Kiam restas am' nur Kiel sola ofer' Al la terosufer' De simpla trubadur',	Kiam restas am' nur Por parol' al kanon' Kaj nur unu kanzon' Por konvink' de tambur',
Kiam restas am' nur Kara por mi kaj vi Por ke dum tuta viv' Regu ĝoj' kaj plezur',	Kiam restas am' nur La unika rezon' La unika kanzon' Kaj unika sekur'...	Kiam restas am' nur Proponebla al ĉi Tiuj, kies konsci' Serĉas lumon trans mur',	Tiam sen io krom La forteco de Am' Kuŝos en nia man' Amik' la tuta mond' !
Kiam restas am' nur Por unika promes' Sen alia riĉec' Krom la fid' pri futur',	Kiam restas am' nur Por ke en frumaten' La povrul' sen mantel' Vestu sin per velur',	Kiam restas am' nur Kiel voj-signalont' Por destino-alfront' Je ĉiu strat-angul',	(Versio 2016-09-06)

Kisu min ankoraŭfoje! _ L'ptit quinquin – L'canchon dormoire

franca teksto kaj muziko Alexandre Desrousseaux; e-a teksto de Raymond Schwartz



"Kisu min ankoraŭfoje, kara patrinet', Kaj mi dormos saĝe kiel anĝelet' !"	Sed rapide jaroj ja forkuras, Kaj junulo estas edzo jam, Kiu varme al edzin' susuras Dolĉajn vortojn pri eterna am'.	Apud forno jen post multaj jaroj Lace sidas avo kaj avin'.
La infano dum vespera horo, Kiam steloj brilas sur ĉiel', Enlitiĝas kaj kun pia koro Kuŝas apud sia pulĉinel'.	Kaj vespere amkarese Al edzino plej promese Ofte kantas li Laŭ la konata melodi':	Tiam malgraŭ siaj blankaj haroj Ili ambaŭ regajigas sin. Kiam ŝerce bonhumore Dum vespero rememore Treme kantas li Laŭ la antikva melodi':
Baldaŭ dormos ĝi trankvile, Sed antaŭe tre ĝentile Diras l' infanet' Al sia kara patrinet':	"Kisu min ankoraŭfoje, kara edzinet', Kaj mi vin dorlotos kiel diablet' !"	"Kisu min ankoraŭfoje, kara avinet', Kaj mi ree estos anĝel-diablet' !"
"Kisu min ankoraŭfoje, kara patrinet', Kaj mi dormos saĝe kiel anĝelet' !"		(Versio 2014-12-15)

La bufoj _ Les crapauds

franca teksto Marc Legrand, muziko Victor Meusy, e-a teksto Civitano

Publikigita en libreto « Kantu » el la kolekto « Sur la verda vojo » de la Nordfranca Federacio de U.E.F.

(1) Nokto estas klara, Marĉo sen sulkara Sur ĉiel' stelara Helas luna or'. Fag', betul', frakseno, Sub nenia tremo En arbar' sereno, La giganta dorm'. En loĝej' la hundo, En kaŝej' la lupo, Eĉ nenia bruto, Nur silent' sur ter'. Jen la bufamaso, Gapas per topazo Kvazaŭ en ekstazo, Kantas en vesper'.	(2) Diras "jen ni blekas, Homodormon tedas Homoj nin malamas, Pro malĝoja kant'. Di' nin kreis bestoj, Kun verukaj kreskoj, Sed ne kaŭz' de pestoj, Nek malbona gent'. Tera haŭt' pustule, Kava jen, jen pufa, Kun veneno pusa, L'abomena krim'. Knaboj nin minacas, Palaj sin forkaŝas, Al ni naŭze kraĉas, Ŝtone pelas nin.	(3) Tere dum sezonoj, Kavoj sub la rokoj, Truoj sub la ŝtonoj, Jen la nia nest'. La serpento rule, Kun ni dormas bule. Kiam pluvus lule, Jen por ni la fest'. Ree promenade, Peze al rampado, Venu ! kamarado, Por regal' al maĉ' Al ĝarden' senĝene, Al limak' gluteme Al l' onisk' festene, Vermon sen grimac'.
---	---	---

(4)
Ŝatas ni lageton, Kotan tualeton
Ĉirkaŭ la barketon, Svarmas la ranar'.
Barko dancas dande. Ĉeno grincas rande.
Akvo klakas plaŭde, Sub la moskitar'.
Tie font' murmuris, Blanka ŝaŭm' forkuras,
La salik' susuras, Al amik' abi'
La libel' el silko, Kun la tulflugilo
Spitas per veziko, Ĉe l' naz' de l' gobi'.

(5)
Kiam akvon lakas, Luno, marĉo glatas,
Sonorilo taktas, Tra la foliar'.
Tiam jen muziko, Kun melankolio,
La vesper-kantiko, Flutas el nufar'.
Fag', betul', frakseno, Sub nenia tremo
En arbar-sereno, La giganta dorm'.
Nokto estas klara, Marĉo sen sulkara
Sur ĉiel' stelara, Helas luna or'.



(Versio 2016-09-04)



La dizertonto _ Le déserteur

muziko kaj franca teksto Boris Vian; e-a teksto Georgo Lagrange

Sinjoro Prezident'
Mi skribas ĉi leteron
Kaj havas mi esperon
Vi legu kun atent'.

Ne ofendiĝu vi,
Se mi per ĝi vin spitas.
Mi ĉion mem decidas
Kaj tuj dizertos mi.

Dum mia kaptitec'
Jam oni la edzinon
Forŝtelis kaj animon
Kaj la pasinton eĉ.

Rifuzu al buĉad'
Rifuzu murd' inciton
Ne faru vi militon.
Rifuzu al murdad'!

Alvenis ĵus paper'
Kun la ordon-invito
Foriri al milito
Jam morgaŭ en vesper'.

Dum mia juna aĝ'
Formortis mia patro,
Foriris mia frato,
Kaj brulis la vilaĝ'.

Jam morgaŭ sen prokrast'
Fermiĝos mia pordo
Al jaroj de la morto,
Kaj fuĝos mi kun hast'.

Se fluu nun la sang'
La propran do vi donos!
Jen kion mi proponos,
Sinjor' de alta rang'.

Mi diras sen rezon',
Ke tion mi ne faros.
Mi sur la ter' ne staros
Por murdo de la hom'.

Patrino pro sufer'
Jam kuŝas en la tombo.
Ne zorgas ŝi pri bombo,
Ne zorgas eĉ pri verm'.

En almozpeta viv'
Mi iros tra la mondo
Mi estos vagabondo
Kaj diros re al vi:

Kaj se vi serĉos min,
Eksciu trup' ĝendarma,
Ke estos mi senarma:
Ĝi pafu do sen tim'.
Ĝi pafu do sen tim'.


(Versio 2014-12-15)

La esper' senlima _ L'espérance folle

muziko kaj franca teksto Guy Beart; e-a teksto Jo-Petro Danvi

(Versio 2014-12-15)

Jen la esper' senlima
Por sent' maltima
Je la nestofal'
Kaj por la bonpreparo
En la gitaro
De nova tonal'
Ekflagras la espero
En la vespero:
Tuj en la imag'
Pli belos la mateno
Je la alveno
De nova la tag',
Al!
Al tuttaga la karnaval'
Ardas mi, scias vi, moral'
Sen skandal' pelas nin al bal';
Al!
Se la plor' estis por vi sal',
Nuna rid' estos la signal',
Ke jam rebelas vetero Sur tero.



Jen la esper' senlima
Por uz' pavima
De l' tomba memor';
Estas en ĉiu ŝtono
La luma sprono
De bato de kor'.
Mensoga estas morto;
La sama forto
Nin pelas al plu',
Kaj ĉi pasantaj birdoj
Elvokas bildon
Pri spuro de ĝu'.
Al!
Al tuttaga la karnaval'
Ardas mi, scias vi, moral'
Sen skandal' pelas nin al bal';
Al!
Se la plor' estis por vi sal',
Nuna rid' estos la signal',
Ke jam rebelas vetero Sur tero.

Jen la esper' senlima
Por flug' anima
Ek! super kampar',
kaj urbo kaj rivero,
Malaltas tero;
Ni flugu en par'!
Certadas la sukceso
Ĝis la eksceso,
Grimpadas mi ĉe l'
Plej supro de la montoj
Por novrenkontoj
En fremda ĉiel'.
Al!
Al tuttaga la karnaval'
Ardas mi, scias vi, moral'
Sen skandal' pelas nin al bal';
Al!
Se la plor' estis por vi sal',
Nuna rid' estos la signal',
Ke jam rebelas vetero Sur tero.



La festo _ La fête

muziko Michel Fugain, franca teksto M. Vidalin, e-a teksto Marcelo

Hej ! Hej hej ! x4 Mond' ŝanĝiĝis en ĉi maten' Jen mi sen kompren'; Estas festo! Ja festo ! Ĉie ĉia ĉiu laik' Estas nun amik'! Estas festo! Ja festo !	Nek bru' nek fum-poluci' Ĉar piediras ni Estas festo! Ja festo! Jen senpagaj pano kaj vin' Ankaŭ flor' sen lim' Estas festo! Ja festo !	Kiel belas mia urbo ! Sen kamion', sen trafik', For gazojlo ! nur botanik' ! Nova stratestetik' ! Kiel belas mia urbo ! Kun ludanta infangrup', Senzorgante ridas la trup' Maltimanta ĉe lup'.	Radias forta bril' de l' sun' Ekŝtormas surpriz' Neniam de nun Samos viv' ! Ni miras sur ĉi nova ter' Kaj antaŭ liber' ; Sed ankaŭ liber' Estas festo ! Ja festo !
Radias forta bril' de l' sun' Ekŝtormas surpriz' Neniam de nun Samos viv' ! Naturo morta antaŭ fin' Revivas el cindr'; Do spiru sen tim', Estas festo! Ja festo!	Radias forta bril' de l' sun' Ekŝtormas surpriz' Neniam de nun Samos viv' ! De tiel longe nia rev' Sopiris ĝis krev', Kaj jen la ricev': Estas festo! Ja festo !	Kaj akv' ! jen akvo laŭ ver' Trinkeblas ĝi rekte el river' Hej ! Hej hej ! x4 Venu tuj por dancopromes' For la malpermes' ! Estas festo! Ja festo ! Mi asertas : ĉi improviz' Estas paradiz' ! Estas festo! Ja festo !	Hej ! He hej ! x2 Festo ! Festo ! Hej ! Hej hej ! x2 Festo ! Venu por festo ! Hej ! Hej hej ! x2 Festo ! Estas festo ! Hej ! Hej hej ! x2 Ha ! (Versio 2016-09-05)

La kongresurboj _ laŭ Les petits patelins

*muziko Marie-Paule Belle; franca teksto F. Mallet-Joris, M. Grisolia
el e-a tekstego de Jo-Petro Danvi, la Kompanoj korŝire devis tranĉi kelkajn kongresraportojn;
li kaj Ĵak Lepuill bonvolu pardoni al ni.*

(1) Ade de Bulonjo-ĉe-la-mar' Kongreson vidis ĉiu jar' De la valoj aŭ de la montar' Alvenas l' esperantistar' Eĉ se 'stas problemo pri la mon' Vojaĝas ni al Vaŝington' Estis elefanta la kotiz' En la kongreso de Pariz'	(2) Malaperis tuta komitat' En la kongreso de Darmstadt Loĝis ni en kooperativ' En la kongres' de Tel-Aviv' Nin salutis la putinkorus' En la kongreso de Arhus, Loka grupo de la papinfan' En la kongres' de l' Vatikan'.	<i>Konklude, dufoje:</i> Ĉiam tuj mi pretas diri jes Por partopreni en kongres' Ĉiam tuj mi pretas diri jes Por partopreni en kongres' (Versio 2014-12-15)
<i>Refreno</i> Ĉiam tuj mi pretas diri jes Por partopreni en kongres' Ĉiam tuj mi pretas diri jes Por partopreni en kongres' Se kelkaj celas al la dorm' Ripozi en la kampardom' Aŭ iri al la famili' Tuj kiam estas ja feri' Preferas mi laŭ interes' La partoprenon en kongres'.	<i>Refreno</i> (3) Ni parolis pri matematik' Dum la kongres' de Rejkjavik' Kaj prelegis multe pri kirurg' En la kongreso de Hamburg' Regis nur la tohuvaĵo En la kongres' de Katmandu' Pro sukceso estis nur gratul' Dum la kongreso de Seul'	

La nordirlanda balado _ La ballade nord-irlandaise

tradicia angla/skota melodio "Oh waly waly" el la 1600aj jaroj kaj pli moderne "the water is wide".
franca teksto Renaud Séchan; e-a teksto Marcelo, Silĉjo kaj FaMo

Lala lala...

Oranĝarbon ĉi ekplantu mi
Kie laŭ kanzon' ne videblus ĝi,
Kaj kie arb' donis tra jar' nur
Grenadojn kun eksplod-terur'.

Ĝis Derry, mia amatin'
Sur mia ŝip' navigis mi.
Mi diris al batalantar':
"Mi venas por ĉi oranĝarb'!"

Kuntrinku ni, ek al kunĝu'!
Milito ne povos daŭri plu
Dank'al bier' kun ĝojamik'
Kaj kantoj laŭ popolmuzik'.



Lala lala...

For ĉiu di' el panoram'!
Sub neniuj kruĉ' plaĉe kreskas am'.
Nur simpla hom', neniuj pastr',
Oranĝon flegas kiel majstr'.

Oranĝarbon ĉi ja plantis mi,
Kie laŭ kanzon' ne videblus ĝi.
Ĝi floris kaj donis al prosper'
Sukerajn fruktojn de la liber'.

Lala lala...

(Versio 2014-12-15)

La sudo _ Le sud

muziko kaj franca teksto Nino Ferrer - e-a teksto pluropo

(enkonduko) la la la ...

(strofo 1)

Similas land' jena al Luiziano
Al Itali'
Vestaĵoj pende sekiĝas sur teraso
Kaj belas ĝi

(refreno 1)

Similas al Sud'
Longtempas la te-emp'
Kaj la vivo dum
Pli ol jarmilion'
Ĉiam dum belsezon'

(ponto 1) la la la ...

(strofo 2)

Infanosvarm' rulas sin sur herbtapiŝo
Kun hundorond'
Eĉ estas kat' kaj testud' kaj oraj fiŝoj
Jen senmanka mond'

(refreno 2, kiel refreno 1)

(ponto 2) la la la ...

(strofo kaj refreno senvortaj) di di di ...

(ponto 3) la la la ...

(strofo 3)

Fatale iam okazos la milito
Ja scias ni
Ni ĝin ne ŝatas sed restas sen decido
"Kulpas sort'" diras ni

(fina refreno)

Domaĝe por Sud'
Je ĉi latitu-ud'
Ni vivintus dum
Pli ol jarmilion'
Ĉiam dum belsezon'



(Versio 2016 09 06)

La tempo ĉeriza _ Le temps des cerises

muziko A. Renard; franca teksto J.B. Clément; e-a teksto G. Lagrange + Marcelo

(1)
Se kantos ni pri la tempo ĉeriza
Kun la najtingal' la mokanta merl'
Festados sen fi(i)no.
Ebrios pro ĝoj' ĉiuj belulinoj,
En amanta kor' ekbrilos sunperl'.
Se kantos ni pri la tempo ĉeriza,
Fajfados en glor' la mokanta merl'.



(2)
Sed ne longas tre la tempo ĉeriza
Dum en vivorev' plukadas junpar'
Orelo-juve(e)lojn.
Ĉerizoj de am' kun rubenaj beloĵ,
Falantaj de l'arb' en sanga gutar'.
Sed longas ne tre la tempo ĉeriza
Dum en vivorev' plukadas junpar'.


(3)
Kaj dum estos vi en tempo ĉeriza,
Se ektimos vi pro amo-ĉagren'
Evidu knabi(i)nojn.
Eĉ se timas ne mi krueldestinojn,
Vivados mi ne sen iam korpem'.
Kaj dum estos vi en tempo ĉeriza,
Ekploros vi mem pro amo-ĉagren'.

(4)
Sed plu amos mi la tempon ĉerizan,
Ĉar de tiu temp' mi gardas en kor'
Vundegon ape(e)rtan.
Kaj Damo Fortun' al mi helpo-preta,
Ne zorgados jam pri mia dolor'.
Sed plu amos mi la tempon ĉerizan:
Memoron pri ĝi mi gardas en kor'.

(Versio 2014-12-15)

Lili _ Lily

muziko kaj franca teksto Pierre Perret; e-a teksto André Cherpillod



(1)
Ne mankis la beleco al ŝi, Lili
Alvenis ĵus el Somali' Lili
Kun enmigrantoj en la ŝip'
Parizon ili venis por
Rapide esti sen labor'.

Ŝin oni nomas "Neĝulin'", Lili
Ŝi trovas tre amuza ĝin, Lili
Eĉ se grincadas la dentar',
Ne cedas ŝi al la koler',
Ridigas ilin la mizer'.

Ŝi kredis ja al egaleco, Lili
En land' de Hugo kaj Volter', Lili
Sed en muziko nigroj du
Egalas unu blankon nur,
La diferenc' videblas tuj.

Frizulon blondan amis ŝi, Lili
Kaj estis preta je edziĝ', Lili
Sed diris la bofamili':
"Rasistoj ja ne estas ni,
Sed tio eblas ne ĉe ni."

Kaj por la timon puŝi for, Lili
Ŝi levas pugnon pro koler', Lili
Meze de la sovaĝa ar',
Kiu bruligas buson ĉar
En ĝi nur rajtas blankular'.

Sopiris ŝi je libereco, Lili
Kaj revis ŝi pri la frateco, Lili
Kun digna tono hotelist'
Al Lili diris sen hezito:
"Nur por blankuloj tie ĉi!"

(3)
Ŝi provis vivi en Usono, Lili
Tiu demokratia land', Lili
Sed ŝi konstatis kun sufero
Ke la kolor' de malespero
Samtiel nigras tie for.

(4)
En ĉia batalado cin, Lili
Renkontos iam bona vir', Lili
Kaj se naskiĝos la infano,
Koloron havos ĝi de am',
La ĉiam nevenkebla am'.

(2)
Latkestoĵojn devis porti ŝi, Lili
Laborojn aĉajn faris ŝi, Lili
Brasikojn vendis sur bazar',
Dum kolorfratoj sur la strato
Ŝin helpis per pikmartelad'.

Sed dum mitingo en Memfis', Lili
Renkontis Anĝelan Davis, Lili
Anĝela diris: "Ho fratin'
Kuniĝu ni, kaj for la timo
De l' lupoj kiuj gvas nin".

Ne mankis la beleco al ŝi, Lili
Alvenis ĵus el Somali', Lili
Kun enmigrantoj en la ŝipo
Parizon ili venis por
Rapide esti sen labor'.

(Versio 2014-12-15)

Majorana _ Marjolaine

franca teksto kaj muziko Nathan Korb (Francis Lemarque), Rudi Revil; e-a teksto Marcelo
laŭ malnova melodio de la germana folkloro, Der treue Husar, popularigita per la filmo
de Stanley Kubrick Paths of Glory (Les Sentiers de la gloire / La glorpadoj)

(1)

Kun la gitar' anonimul'
Sur trotuar' en pluvnebul'
Kanzonon kantis kantis plu
Kaj la kompanoj eĥis pli kun ĝu'

Majorana, vi bela gem'
Majorana, floras ekprintemp'
Majorana, soldatis mi
Sed ja hodiaŭ venas re al vi

(2)

Vi diris ke atendos vi
Mi diris ke revenos mi
Mi iris nur adoleskant'
Revenas nun virvira esperant'

Majorana, vi bela gem'
Majorana, jen promesoten'
Majorana, soldatis mi
Sed ja hodiaŭ venas re al vi

(3)

Forestis mi dum jaroj dek
Ŝanĝiĝis ĉio laŭ aspekto
Nenion hom' pro malsamstat'
Rekonas krom ĉielon super strat'


Majorana, vi bela gem'
Majorana, fuĝas la printemp'
Majorana, mi scias jam:
Revenos ne plu la perdita am'!

(4)

Nun for gitar', anonimul',
Sveninta par' en pluvnebul',
Kompanoj jam do iris dis-
portante am-kanzonon por la
ĝis'.

Majorana, vi bela gem'
Majorana, floras ekprintemp'
La la lala la, la la la...

(Versio 2014-12-15)



Mina mond' _ Les corons

muziko Pierre Bachelet; franca teksto J.P. Lang; e-a teksto Silĉjo kaj Marcelo

Refreno:

Ĉe l' nord', estis mina mond';
La grund' estis karba font';
Ĉiel' estis horizont';
Homar' nur minista rond'.

(1)

Fenestroj en simil' viciĝis sur la strat';
Pro pluvo gutis lernosak'.
Post labor' tiel brilis blu' en patrokul',
Ke ŝajnis ĝi ĉielspegul'.
Mi lernis hejme pli, kun vang' ĉe lia brak';
Fieris li pro mia fak'.
Li estis sindonema kiel homoj ĉi,
Kaj dank' al li mi estas mi.

Refreno

(2)

Jen mia infanaĝ', feliĉis tiu temp'
Vaporo el lavuja tremp'.
Mineja ŝutamas' por mi fariĝis mont',
De sur videblis kamparblond';
Ministo estis patro kiel lia patr',
Blankiĝis la patrino kap'.
Devenis ili de foseja origin'.
Mi dank' al ili konas min.



Refreno

(3)

Kun glor' en urbodom' je tago de kermes'
Pendadis foto de Ĵores'.
Kaj ĉiu glas' da vino ŝajnis rubenroz'
Kun bril' sur fon' de silikoz';
Paroloj pri la strik', pri eksplod' pro grizu',
Pri akcidentoj en la tru'.
Al ili kiel land' ja plaĉis la meti'
Kun ili do komprenis mi:

Refreno

Ĉiel' estis horizont';
Homar' nur minista rond'.

(Versio 2014-12-15)

Nova mond' _ Un autre monde

muziko Téléphone; franca teksto Jean-Louis Aubert; e-a teksto Marcelo



Revis mi pri nova mo-ond'
Kie tero estus rond'
Kie brilus luna blo-ond'
Kaj la viv' fekunda o-ond'

Dormis tre profunde mi
Ne plu vidis kun raci'
Revis mi realon ĉi
Realon de mi-i

Revis mi pri nova ter'
Kie restus la miste-er'
Jen ter' kun pli da leĝer'
Forspiti volis mi en ver'!

Ŝlosis la okulojn mi
La piedojn vidis ne
Revis mi realon ĉi
Realon de mi-i, re al ond' mi-i!

Revis mi pri nia mond'
Kaj la ter' estas ro-ond'
Kaj la lun', bela blo-ond'
Nokten dancu ombroj de l' mo-ond'

Ĉar mi revis ĝin sen mov'
Ĝi trovis min vana blo'v'
Sed kiam ĝi turnis sin
Realo de mi-i pardonis mi-in

Pardonis mi-in
Realo de mi-i pardonis mi-in
Dancu ombroj de la mo-ond'
Dancu ombroj de la mo-ond'
Dancu ombroj de la mo-ond'
Dancu ombroj de la mo-ond'
Hej! Hej!
Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu!
Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu!
Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu!
Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu! Dan-cu!

(Versio 2014-12-15)

Sur la placo _ Sur la place

Franca teksto kaj muziko Jacques Brel, E-a teksto Janine Dumoulin kaj Pierre Bouvier

Sur la placo arda pro sun'
Junulin' ekdancas kaj nun
Ŝi turniĝas kiel, sen ĉes',
Dancistinoj en antikvec'.
En la urbo pro varm' kaj ŝvit'
Emas al dormo vir' kaj virin'
Dum rigardas ili tra vitr'
La knabinon danci sen fin'.

Tiel foje jen al ni
Lum' aperas en l' anim'
En preĝejo laŭ kutim'
Ĝin ni nomis bona di'
Por amant' ĝi estas la am'
Kordonac' por l' almozul'
Por la sun' ĝi estas la flam'
Kaj kompat' por la bonul'

Sur la placo vibra pro ard'
Eĉ ne hundo emas al star'
Ondomova laŭ emoci'
Tien kaj reen saltas ŝi
Nek gitar' nek tamburin'
Akompanas ŝin en danc'
Per manfrapoj taktas l' ulin'
Por kadenci ĝis la trans'

Tiel foje jen al ni
Lum' aperas en l' anim'
En preĝejo laŭ kutim'
Ĝin ni nomis bona di'
Por amant' ĝi estas la am'
Kordonac' por l' almozul'
Por la sun' ĝi estas la flam'
Kaj kompat' por la bonul'.

Sur la placo regas trankvil'
Jen knabin' ekkantis en bril'
Tra l' aer' ŝvebas la kant'
Himno al am' kaj por amant'.
Sed en la urbo nun varmas tro
Kaj por la kant' ne esti aŭdant',
Vitroj fermiĝas, jen kontraŭ'
Kiel la dis' de mortant' al vivant'

Tiel foje jen al ni
Flam' aperas en la kor'
Sed volas neniam ni
Ĝin plu havi en memor'
La orelojn ŝtopas ni
Kaj okulojn kaŝas ni,
Ĉar ni ne emas al vek'
De nia kor' jam en sek'.


Sur la placo blekas plu hund'
Ĉar l' ulin' for estas nun
Kaj kiel hund' blekas al mort'
Ploras la homoj pri si - a sort'.

(Versio 2016-09-04)



Tuj la kompanar' _ Les copains d'abord

muziko kaj franca teksto Georges Brassens, e-a teksto Bernard Legeay kaj Marcelo



Ne apartenis al la skip'
De l' Meduzflosio tiu ŝip'
Famigu tion en haven'
En ĉiu haven'.
Navigis ĝi sen avatar'
Kviete sur la granda mar',
Nomiĝis Tuj La Kompanar' !
Tuj La Kompanar' !

Deviz' : "Fluktuat nek mergitur"
Ne estis nur literatur',
Malplaĉu al la perfidul',
Al la perfidul'.
Matrosoj kaj la kapitan'
Ne estis fiaĉula klan'
Sed vera samideanar',
Samideanar' !

Inklinis ili ne al luks'
Nek estis Kastor' kaj Poluks'
Nek el Sodomo kaj Gomor'
Sodom' kaj Gomor',

Ne similec' al simpati'
Inter Montenj' kaj Boesi',
Nur amuziĝo jen la far'
De La Kompanar'.

En ĝi troviĝis ne anĝel'
Konanta pri la dia cel',
Nur amikeco en fanfar',
Nur am' sen kompar',
Ĵan', Pier', Pol' kaj kompani'
Jen ĝia nura litani'
Kaj ĝiaj kredo kaj deklaro',
Jen La Kompanar'!

Se ekblovegis la tempest',
Stariĝis tuj la amikec',
Ĝi rolis kiel markompas',
Samkiel kompas'.
Se ekminacis la danĝer'
Kaj ŝanceliĝis la esper',
Ekvelis for de la koŝmar'
Tuj La Kompanar'.

Je l' rendezu' de l' amikec'
Maloftis ies neĉeest',
Kunulo mankis sur ferdek',
Nur pro mortopek',
Sed poreterne en la mar'
Malplena truo restis ĉar
Li mankis plue jar' post jar'
En La Kompanar'.

Multegajn ŝipojn konis mi
Sed pri nur unu fidas mi
Velanta en tutsolidar',
En tutsolidar'!
Navigis ĝi sen avatar'
Kviete sur la granda mar',
Nomiĝis Tuj La Kompanar'!
Tuj La Kompanar'!

(muzika enkonduko
kaj lasta strofo denove)

(Versio 2016-09-05)

Volas mi _ Je veux

interpretis Zaz ; muziko T. Solanilla, K. Soltani ; franca teksto K. Soltani ; e-a teksto Marcelo

(1)
Ĉambron en hotelo Ritz
 Ne volas mi
Orjuvelojn de Ŝanel'
 Ne volas mi
Limuzinaŭtegon, ĉu ?
 Fuŝambici'
Pa pa la pa pa pa la
Servistar' je mia cel'
 Por kio do ?
Belkastel' en Neŭŝatel'
 Ne dankon tro !
Nur por mi la tur' Efel'
 Por kio do ?
Pa pa la pa pa pa la

Refreno
Por mi valoras am', ĝoj' kaj bonhumor' !
Ne feliĉos mi dank'al via or'
Forpasu mi kun plej bona kor'
Pa pa la pa pa pa la
Liberon mian kune malkovru ni
Forgesu tuj misjuĝojn fi !
Bonvenu vi en mia medi'



(Versio 2014-12-15)

(2)
Naŭzas min la bonkondukt'
 Jen tro por mi
Voras mi kun rukta glut'
 Jen mi sen pli
Laŭtas mia ver-perkut'
 Pardonu min
Pa pa la pa pa pa la
El hipokritekohont'
 Mi fuĝas ja
Tedas min klopoda tromp'
 Fin' de l' saga'
Ĉiel mi 'stas sen rankor'
 Jen mi, sed ba!
Pa pa la pa pa pa la

*Refreno, muzika improvizado
kaj denove refreno 2 foje*

Ce soir, à 20h30, à l'auditorium du conservatoire, venez revoir « La Kompanoj » qui chanteront BREL en espéranto (entrée au chapeau). Un verre de l'amitié sera servi à l'entracte pour fêter le 20^e anniversaire d'Espéranto-Vendée.



Esperanto : le monde au bout de la langue !

Pour en savoir plus sur l'espéranto : <http://esperanto.net>

Associations nationales :

<http://esperanto-france.org/> et <http://www.sat-amikaro.org/>

Pour apprendre l'espéranto sur Internet :

<http://lernu.net> ou <http://ikurso.esperanto-france.org/> ou <http://kurso.com.br/>



Avec le soutien de
Ry la ville
La Roche-sur-Yon